

MUZIKA PROJEKTO : Brel en esperanto

La kompanio Duoble Unu ĝojas anonci vin ellaboradon de nova muzika projekto : la KD Brel en esperanto.

Komenciĝas dum la Satamikara kongreso en 2004 per amika renkonto inter FaMo, kantisto/akordeonisto, kaj la du membroj de la Kio Duoble Unu, Fransŭaz kaj Patrik (ili ofte koncertis dum esperantaj aranĝoj kaj signis originalajn esperantajn kanzonojn, en la KD Sen lim' ĝis, premiita en la Belarta konkurso 2010). Fulmrapide amikeco naskiĝis kaj sekvis muzika kunlaborado, ĉu por kompaniaj projektoj ĉu por personaj projektoj de FaMo.

Dum la nacia vespero de la 100a UK en Lillo, la trupo La Kompanoj prezentis kantospektaklon titolitan « Brel Inter la gigantoj » en kiu FaMo kantis 5 kantojn de Jacques Brel, mondfama belga kantisto. Tie naskiĝis la projektoideo. Ĉefe du Kompanoj sekvis FaMon kaj lia akordiono en tiu aventuro : Bernard Legeay (suzafono) kaj Pjer Buvje (voĉo, banĝo, gitaro, kontrabaso). Ili, kun kelkaj helpantoj, tradukis pliajn kanzonojn de Brel por tuta spektaklo kaj tuta muzikalbumo el Brel-kantoj, tio neniam okazis antaŭe en Esperantujo. Post Lillo la tri Kompanoj plurfoje koncertis dum esperantaj eventoj kun tiu repertuaro kaj plue koncertos en 2018, jaro de la 40a datreveno de la Brel forpaso.

Lastjare FaMo petis helpon de la Kio Duoble Unu por eldoni la Kdon. Ni obtenis taŭgajn permesojn pri 13 kanzonoj, kaj komencas labori por la surbendigado. Ĝi okazos en la studio de Duoble Unu, mastrata de Patrik Delabi.

Sed, se ni havas la artistajn rimedojn, mankas la financaj rimedoj... Tial ni petas helpon de la esperanta movado.

Kiel helpi al la naskiĝo de la unua Kd de Jacques Brel en esperanto ?

Vi povas helpi antaŭmendante Kdojn aŭ farante mondonacon.

La apero okazos plejlaste en januaro 2018.

Por koni ĉiujn detalojn (kanzonoj, prezoj, sendkostoj, pagmanieroj, ktp.), bonvolu viziti la retejon de la Kio Duoble Unu : www.doubleun.com

Kio Duoble Unu, FaMo, Fransŭaz Rochette

Ĉ ĉ Ĝ ĝ Ĵ ĵ Ŝ ŝ ŭ